IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 52 - trimonata
2022/3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Daniele Binaghi
Duncan Charters
Renato Corsetti
Gian Carlo Fighiera
Maximiliano Garcia
Mireille Grosjean
Zsófia Kóródy
Aranka Laslo
Stefan MacGill
Luigia Oberrauch Madella
Radojica Petrovič
Ahmad Reza Mamduhi
Paolo Scotti



Prof. Pennacchietti kaj "Lingva Higieno" en ILEI-Simpozio 2022

ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Ahmad Reza MAMDUHI: *VEKI-3: jam kutima kongresformo!*..... 4
Impresoj de kelkaj partoprenintoj de VEKI-3 (A. LASLO, L. OBERRAUCH, M. GARCIA, R. CORSETTI, M. GROSJEAN)..... 21
Salutmesaĝo de UEA al la 55-a Kongreso de ILEI (Duncan CHARTERS).. 23
Radojica PETROVIĆ: *Realaj spertoj el virtualaj eventoj*..... 25
Premio La Torre 2022 estis aljuĝita al Nitta Takamichi..... 28
El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, IT, RS) 30
AMO ĝis la jarfino (Stefan MACGILL)..... 35
Alvoko kaj aliĝilo por la 56-a Kongreso de ILEI en Italio..... 37
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj 36, 39

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Ĵanejro cep 21220-310, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram,WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Membroj*:**

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Prof. Pennacchietti prelegis pri "Lingva Higieno" en ILEI-Simpozio 2022

Sur la dorskovrilo: ekranfoto farita ĉe la fermo de VEKI-3

Enkonduko

Karaj legantoj,

Plimulto de tiu ĉi numero de IPR estas pri VEKI-3,

- kiu refoje montris, ke precipe en nia diaspora mondo de Esperato „ju pli virtuale, des pli demokratie, inkluziveme, sen-diskriminacie kaj vaste!" Dum VEKI-3 partoprenanto diris, ke li tre gajas, ke ankaŭ ĉijare ILEI-Kongreso okazas virtuale, ĉar se ne, li fakte ne povus partopreni en ĝi.

- kies retpaĝo[1] - danke al inĝ. Hamzeh Shafiee, aktiva membro de IrLEI - proksimigis nin pluan paŝon al la futura formo de niaj renkontiĝoj por pli efika sekvado kaj utiligado de prezentitaj programeroj, ĉar nun per simpla klako sur ĉiu preleg-titolo vi povas spekti ĝian kompletan registraĵon en la jutuba kanalo de UEA (UEAviva), ankaŭ kie la evento estis vive elsendata. Tie, krom la nomoj kaj biografietoj de la prelagantoj, vi povas legi ankaŭ priskribojn de iliaj prelegoj. Espereble baldaŭ sub ĉiu prelego oni povos skribi siajn komentojn kaj demandojn, kie la prelegintoj povos reagi, kaj sekve de ĉio ĉi, probable ni praktike pli utiligos la prelegenhavojn por realigi multon bonan efeltive.

Ekz., mi antaŭvidas gigantan influon de la prelego de prof. Fabrizio Pennacchietti, la ĉefpreleganto de ILEI-Simpozio, pri „Lingva Higieno" kaj Esperanto, se ni bone disvastigu ĝian esencon kreante novan diskurson, kiu multege helpos al plialtigo de la prestiĝo de nia lingvo.

Ahmad Reza MAMDUHI

[1] Vidu ĉe: https://www.espero.ir/eo/veki-3/

VEKI-3: jam kutima kongresformo!

23-30 julio 2022, tutmonde

55 prelegoj fare de 48 prelegantoj dum 8 tagoj!

Raportartikolo de Ahmad Reza MAMDUHI

La 55-a ILEI-Kongreso okazis tute virtuale kun la titolo „la 3-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI" (VEKI-3). Tio estis la tria sinsekva fojo, ke anstataŭ la kutimaj ĉeestaj Kongresoj de ILEI, ni povis ĝui grandiozan virtualan kunvenon el niaj propra domo, laborejo aŭ … aŭto. Kvankam ĉiuj ni bone konscias pri ege pozitivaj ecoj de ĉeestaj kaj tradiciaj kongresoj, tamen laŭ tio, kion esprimis kelkaj partoprenantoj de VEKI-3, multaj bonvenigis la virtualiĝon de la Kongreso, ĉar alikaze ili fakte ne povus ĉeesti kaj ĝui la ŝatatan kunvenon diverskiale.

Ĉeftemo de VEKI-3

Malgraŭ la virtualiĝo de la 55-a Kongreso de ILEI, kiu okazintus en Kebekio, Kanado, ĝia ĉeftemo restis la sama, t.e.: „**Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado**", ĉar kiel sciate la temo ne nur validas pri la dulingva medio de Kebekio, sed – kiel pruviĝis dum VEKI-3 – validas kaj interesas multajn en tute diversaj partoj de la mondo.

Rilate al la ĉeftemo de VEKI-3, prelegis i.a. Trevor Steele (granda verkisto kaj instruisto de Esperanto) sub titolo: Eduki denaskulon; d-ino Laura Brazzabeni (ILEI-estrarano pri kongresoj) kun titolo: Dulingva edukado kaj enmigrado; kaj prof. Amri Wandel (UEA-estrarano pri scienca kaj faka agado, meza oriento kaj norda afriko) pri la temo: Denaska multlingva edukado.

Retejoj de VEKI-3

Por organizado, informado kaj okazigado de VEKI-3, ĉefe funkciis 3 retejoj: unue la jama kaj fama retejo de ILEI (ilei.info), kiu krom informado pri la virtualiĝo de la 55-a ILEI-Kongreso, donis ligilojn al du aliaj retejoj, unu por senpaga kaj tuja aliĝo al VEKI-3, la alia por vidi la ampleksan programon de la evento (https://www.espero.ir/eo/veki-3/), kiu entenis 33 prelegojn fare de 33 prelegantoj, 8 diskutrondojn kaj 6 koncertojn. Tiu ĉi retejo, kiun kreis kaj prizorgis inĝ. Hamzeh Shafiee, aktiva membro de IrLEI (irana sekcio de ILEI), krom la nomo kaj titolo de ĉiu prelego, disponigis koncizajn biografiojn de la prelegantoj kune kun priskriboj de la prelegoj, nun havas

ankaŭ ligilojn al la registraĵoj de plej multaj programeroj de VEKI-3, kiuj vive elsendiĝis ankaŭ en la jutuba kanalo de UEA (youtube.com/UEAviva).

Ĉar temis pri tutmoda evento, la horoj estis menciitaj nur laŭ la Universala Tempo Kunordigita (UTK/angle: UTC) kaj tra Esperantlingva retejo (https://time.is/eo/UTC) oni povis/as vidi ĉiumomente la horon laŭ tio.

La Malferma Tago

Komence de la Malfermo de VEKI-3 (sabaton, la 23-an de julio), salutmesaĝis la eventon profesoroj Humphrey Tonkin, eksprezidanto de UEA kaj TEJO, kaj honora prezidanto de UEA, kaj Duncan Charters, la prezidanto de UEA. La mesaĝon de Tonkin voĉlegis d-rino Alessandra Madella, vicprezidanto de ILEI. Jen la teksto de la mesaĝo:



„Kvankam mi normale akceptus vian inviton prelegi en VEKI-3 aŭ la Simpozio, mi tamen devas malakcepti pro la amaso da nefinitaj taskoj, kiuj momente sieĝas min. Aldoni ankoraŭ unu devon al tiu listo estus ja senrespondece. Mi tamen deziras al ambaŭ aranĝoj grandan sukceson.

Mi deziras al VEKI-3 ĉian sukceson kaj ĝojas pri la entuziasma kaj multflanka agado de ILEI en lastaj jaroj.

> Estas tre bedaŭrinde, ke ILEI ne povos kongresi fizike ĉi-jare – post tiom da energio kaj imagopovo de la eksa kaj nuna prezidantoj de ILEI kaj de la lokaj organizantoj. Sed mi ne dubas, ke la diversflankaj interrilatoj de la membroj de ILEI produktos pozitivajn rezultojn.

Prof. Charters dum sia 9-minuta videa salutmesaĝo, kies kompletan tekston vi trovas aliloke en tiu ĉi numero de IPR, diris i.a.:

> „Kiel evidentiĝis en la ĉi-monata forumo organizita de niaj reprezentantoj kiel flankevento okaze de konferenco de Unuiĝintaj Nacioj, urĝas sendiskriminacia edukado de infanoj ne nur en unu aŭ du oficialaj lingvoj de ilia nacio, kiuj povas esti tute fremdaj al la ĉiutaga hejmlingva uzado, sed en iliaj indiĝenaj lingvoj kun aliro al aliaj lingvoj gravaj por progreso en la socio.
>
> Esperanto povas esti utila lingvokonsciiga kaj kulturvastiga instrumento por faciligi la edukajn celojn de nediskriminacia lingvolernado por infanoj de ĉiuj etnaj grupoj kaj sociaj tavoloj.”

Poste salutmesaĝe parolis vive Albert Stalin Garrido, vicprezidanto de TEJO; Laura Brazzabeni, estrarano de ILEI pri kongresoj; kaj Ahmad Mamduhi, ILEI-prezidanto. Post li, tri aliaj tiumomente ĉeestantaj estraranoj

de ILEI salutmesaĝis la kunvenon: d-ino Alessandra Madella, vicprezidanto de ILEI, Marija Jerković, estrarano pri lerneja kaj landa agadoj, kaj Radojica Petrović, estrarano pri eduk-projektoj, universitata agado kaj instru-kapabligado.

Fine de la Malfermo, Suzanne Roy (Kebekio), kiu estintus la ĉefrolulino kaj respondeculo por la ĉeesta okazigado de nia Kongreso en Kebekurbo, parolis kelkminute pri la urbo, kies viziton ni perdis pro la virtualiĝo de la evento. Poste ŝi montris tre allogan 5-minutan filmon pri la urbo. En siaj paroloj ŝi diris i.a., ke la origino de la urbo-nomo estas de loka indiĝena lingvo signifanta „mallarĝiĝo"n (de riverego) ĉe ĝi.

Diskutrondoj de VEKI-3

Ĉiam diskutrondoj estas inter la plej allogaj kaj enplektaj programeroj, kiuj bone engaĝas ankaŭ la ĉeestantojn. Por estigi kaj utiligi tian etoson, okazis diversaj diskutrondoj dum VEKI-3.

Eĉ al la unua tago de la evento ne mankis ili, jen interesa diskuttemo, kiu vigligis la komencan tagon de la kongreso:

- Tri-latera kunlaborado: UEA, TEJO kaj ILEI

La unuan diskutrondon titolite „UEA-TEJO-ILEI" okazigis la prezidantoj de UEA kaj ILEI kun la vicprezidanto de TEJO, Albert Stalin Garrido, kiu ankaŭ estas la observanto de TEJO ĉe ILEI. En la diskutrondo ili aludis i.a. al unua tri-flanka kunsido en la 31-a de majo 2022, kiun ili havis kune por interkonsenti pri pli multa kunlaborado kaj probablaj komunaj projektoj, planoj kaj agadoj ĉu rilate al siaj ĉiujaraj kongresoj, ĉu pri siaj organoj kaj aliaj eldonaĵoj, ĉu pri interprezentadoj de siaj organizoj kaj celoj por varbi pli da membroj unu por la aliaj.

Kaj jen la listo kaj koncizaj priskriboj de aliaj diskutrondoj, kiuj okazis dum VEKI-3:

- Kiel allogi novajn, junajn instruistojn al ILEI? fare de Didier Janot, inĝeniero pri informadiko kaj telekomunikado, ankaŭ laborinta kiel merkatikisto, Esperanto-aktivulo en Parizo, Francio. Lia diskutrondo okazis plurfoje dum diversaj tagoj kaj horoj, ĉar temis pri laŭvorte vivograva temo por ILEI (kaj fakte por la tuta movado) kaj bezonis ĉeestantajn partoprenantojn el ĉiuj hor-zonoj de la mondo.

- UNESKO fare de Alessandra Madella, Mireille Grosjean, Max Garcia, Didier Janot, Renée Triolle, Monique Arnaud kaj François Lo Jacomo, ĉiuj

konataj vizaĝoj en Esperantujo kaj aktivaj ankaŭ pri Esperanto ĉe UNESKO. Ili kune diskutis kaj diskutigis la ĉeestantaron pri la pasinteco, nuntempo kaj estonto de la rilatoj inter ILEI kaj UNESKO danke al siaj jam riĉaj spertoj kaj kontribuoj ĉi-terene.

- 30 oraj horoj: Instruado en lernejoj, la 30 horoj kaj adaptigo aliloke fare de Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni kaj Alessandra Madella.

La projekto „30 ore d'oro" (30 oraj horoj, www.30oredoro.it) preskaŭ tuj ricevis petojn pri kopiado kaj adaptado kaj de aliaj italaj regionoj kaj de aliaj ŝtatoj. Ĝiaj verkintoj tute favore opinias pri la fakto, ke la kurso estu distribuata en aliaj mondopartoj, egala aŭ, laŭbezone, adaptata surbaze de la lokaj cirkonstancoj. La diskuto centriĝis je la diversaj bezonoj en unuopaj aliaj mondopartoj por ĝin apliki kaj ĝin oportune adapti. La kreintoj de la projekto volonte respondis al la priaj demandoj.

- ILEI-sekcioj fare de prof. Renato Corsetti kaj Marija Jerković. Corsetti estas „Veterana esperantisto provanta transdoni al junaj esperantistoj la instigon ŝanĝi la mondon." Nun li ĉefe instruas Esperanton rete por diverskontinentaj lernantoj kadre de ILEI/IrEA-projekto Esperanto-kursaro Tibor Sekelj (EtoSo: https://www.espero.ir/eo/kursaro/). Jerković estas ILEI-estrarano pri Lerneja kaj landa agadoj. Ili kune jam de monatoj laboras por pliaktivigi la Sekciojn de ILEI tra la mondo kaj ĝiseble plimultigi ilian nombron. Laŭ ili:

„Ĉar la landaj sekcioj estas la plej gravaj labor-organoj de ILEI, se ili ne funkcias, ILEI estas malplena skatolo. Ni ekzamenos la staton de la ĉeestantaj Sekcioj kaj parolos pri tio, kiel la centra ILEI povas helpi siajn Sekciojn atingi siajn celojn."



- Estonteco de ILEI fare de Ahmad Mamduhi. En sia relative longa enkonduko al la diskuto, li gravigis la rolon de idealismo kaj revemo ĉu por la komenca kaj ĝisnunaj etapoj de evoluado kaj disvastigado de Esperanto kaj aliaj bonaj ideoj ekster Esperantujo, ĉu por la estonteco de ili. Laŭ li ideale la estonta ILEI tra siaj Sekcioj estos en proksima kaj fruktodona kontaktado kun naciaj institucioj kaj asocioj de instruistoj mondvaste kaj por prezenti al ili Esperanton kaj ĝiajn potencialojn por edukado, komunikado kaj paco, kaj por instrui al ili nian lingvon, kaj finafaze por varbi ilin al ILEI. Li antaŭbonvenigis tiajn rilatojn ankaŭ kun diversaj NRO-j pri

ekz-e paco, mediprotektado, batalo kontraŭ la tera varmiĝo, savado de pereantaj lingvoj k.s.. Sekvis divers-vidpunktaj diskutadoj pri la temo fare de ĉeestantoj.

- Afriko fare de Mireille Grosjean, eksprezidanto de ILEI, kiu multe aktivis/as ankaŭ pri la „lulila kontintento de homo".

Laŭ ŝi, afrikanoj (multaj, ne ĉiuj) havas saĝtelefonojn kaj uzas Whatsapp-on. Ili povas paroli kun multaj homoj en la tuta mondo. Ŝia demando en la diskutrondo ĉefe temis pri tio, en kio la uzo de Esperanto superas tiajn internaciajn kontaktojn?

- Duhora interkultura diskutado fare de Duncan Charters, Ilona Koutny kaj Ahmad Mamduhi.

Ĉu esperantistiĝo faras nin interkulture kompetentaj homoj, aŭ nur pretigas nin por akiri tian vere gravan kompetenton precipe en la nuna ĉiam pli malgrandiĝanta mondo? Ili diskutis kaj diskutigis la ĉeestantojn pri tio kaj pri la rilataj subtemoj. Dum la duhora diskutrondo oni povis konatiĝi kun multaj ege interesaj ekzemploj pri iam ege delikataj sed same gravaj diferencoj en interpretado de diversaj agoj kaj paroloj – eĉ korpgestaj – eĉ inter esperantistoj el diversaj kulturaj fonoj.

Premio La Torre

Kadre de VEKI-3 okazis ankaŭ ceremonio por la Premio La Torre 2022, kiu inkluzivis prelegon de prof. Renato Corsetti pri la karmemora prof. Mauro La Torre (1946-1910), kiu dum sia prezidanteco de ILEI, en la jaro 1998, lanĉis la interlernejan edukprojekton **Interkulturo**, celantan egalrajtan interkulturan edukadon. Pro tiu projekto, en 2000, li elektiĝis kiel la Esperantisto de la Jaro. Li estis membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino (AIS) kaj – ekde 2007 – de la Akademio de Esperanto.

Dum la programero oni povis aŭskulti ankaŭ interesajn klarigojn de d-ino Alessandra Madella pri la Premio kaj parolojn de familianoj kaj amikoj de Mauro La Torre.

La gajninto de la ĉi-jara eldono de la Premio estis s-ro Nitta Takamichi (1981-) el Japanio, kiu post la ceremonio prelegis enkondukante sian premiitan verkon. Li proponas novan metodon, per kiu pli efike realigeblas aktiva lernado de Esperanto. Dum sia interesa prelego li parolis pri la baza koncepto de la nova metodo kaj praktike montris, kiel gvidantoj de Esperanto-kursoj povas instrui laŭ la nova metodo.

Konsulta Komitat-kunsido

Lunde, en la 25-a de julio, de la 12:00-14:00 UTC okazis Konsulta Komitat-kunsido de ILEI ĉefe por ĝisdatigi la membronombrojn de diversaj landoj kaj regionoj, kiuj siavice difinas la nombron de la komitatanoj, kiujn ĉiu lando/regiono rajtas havi en ILEI. Oni decidis, ke post tio, kaj fakte post VEKI-3, okazu la kutima Komitat-kunsido de ILEI por pritrakti la bezonatajn temojn kaj fari la necesajn decidojn.

Aliaj prelegoj de VEKI-3

Dum VEKI-3 okazis 39 prelegoj fare de 33 prelegantoj. Krome, tri prelegoj okazis dum AMO-89 fare de 2 prelegantoj kaj 13 prelegoj prezentiĝis per 13 prelegantoj dum la Simpozio de ILEI. Do, entute temis pri enormaj nombroj de 55 prelegoj kaj 48 prelegantoj dum la tuta 8-taga evento!

Jen provo por iomgrada klasifikado de nur la 39 prelegoj liveritaj dum la ĉi-foja kongreso de ILEI, t.e. VEKI-3:

1- Prelegoj pri projektoj kaj organo de ILEI

Krom prelego pro la projekto „30 oraj horoj", pri kiu supre oni iom parolis, okazis jenaj prelegoj:



IPR hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ fare de Jozefo Németh, hungara pedagogo naskiĝinta en 1960, kiu ekde 1995 okupiĝas pri la redaktado de *Internacia Pedagogia Revuo*, la organo de ILEI.

Li parolis pri la antaŭaĵoj de la nuna IPR: ĝiaj diversaj epokoj kaj eldonantoj. Li prezentis la naskiĝon de la nuna serio parolante pri ĝiaj redaktoroj ekde 1970, kunlaborantoj (post 1995), presejoj, formato, redakcia labormetodo, funkcioj de la revuo, enhavo, estonteco kaj la retejo de la revuo.

La kunlabora projekto VERDEN fare de Rodica Todor (Rumanio), emerita psikologo, membro de la rumana sekcio de ILEI, prezidantino de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), asocio kiu subskribis kunlaboran kontrakton kun ILEI, Vito Tornillo (Italio), sekretario de IFEF ekde 2010 kaj Ladislav Hakl (Ĉeĥio).

Ili parolis pri la kadro de la projekto „VERDEN", Erasmus+ kaj „edukado de plenkreskuloj" kaj tio, ke ĝia ŝlosila kampanjo estas „kunlaboro inter organizaĵoj kaj institucioj". La ĉefa temo de la projekto estas „daŭripova

evoluo kaj transporto", kio siavice estas ligita al pli ĝenerala temo pri klimatprotektado kaj daŭripoveco.

Kunordigata de UEA, VERDEN okazas per kunlaboro de pluraj sekcioj de IFEF kaj Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI), faka sekcio de TEJO. Konsilas ĝin instruistoj de ILEI kaj kolegoj de AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj).

2- Prelegoj pri instruado kaj novaj instruspertoj

Krom diversaj diskutrondoj, dum kiuj oni pli aŭ malpli parolis aŭ aludis ankaŭ pri diversaj instru-metodoj kaj -spertoj, okazis jenaj pli specife rilataj prelegoj:

E-Radiofonio inter la pioniroj de la publika lingvoinstruado fare de Barbara Pietrzak, la ĉefredaktoro de la Pola RetRadio en Esperanto.



Dum sia prelego ŝi diris i.a., ke kiam en 1922 kreiĝis la unuaj E-radioelsendoj, el pluraj radiostacioj aŭdiĝis ankaŭ diversnivelaj E-kursoj. Apartan rolon ili plenumis por esperantistoj en izolitaj medioj sen E-kluboj kaj -grupoj. Kvankam E-kursoj ne plu aperas en la programoj de la E-elsendoj, tamen iliaj programoj daŭre plenumas la instruan kaj klerigan rolon.

Esperanto-kursoj en nia universitato kaj jutubaj intervujoj fare de Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, kiuj kune nuntempe gvidas universitatan kurson de Esperanto kaj aktive kunlaboras en la Esperanto-eldonejo „Impeto" kaj … redaktas la revuon *Esperanto*.

Dum sia komuna kaj vigla prelego ili parolis pri siaj spertoj dum instruado de Esperanto en universitato (RUDN), pri la evoluoj de la Esperanta eldonado, kadre de la eldonejo „Impeto", novaj filmetoj ĉe jutubo, revuo *Esperanto* kaj pri aliaj aktivaĵoj en la E-mondo.

La lerneja eksperimento de Helmut Sonnabend fare de François Lo Jacomo, emerita matematikisto kaj lingvisto, nun aktiva en Greziljono, Akademio de Esperanto, UEA, EDE, k.a., kiu estis dum dudeko da jaroj reprezentanto de ILEI ĉe Unesko kaj nun estas reprezentanto de UEA ĉe Unesko.

Laŭ lia ege interesa kaj malkaŝa prelego, Helmut Sonnabend, prezidanto de ILEI, kiu en 1977 sukcesis partnerigi ILEI kun Unesko (C-kategorio), samtempe realigis eksperimenton, dum kiu 11-jaraj geknaboj el malsamlingvaj eŭropaj landoj lernintaj Esperanton dum du jaroj, kunvenis unu semajnon en la belga urbo Saint-Gérard por kune plentempe lerni ĉiun bazlernejan fakon nur en Esperanto.

Kion oni instruu pri kulturo en klasoj de Esperanto? fare de prof. Duncan Charters, prezidanto de UEA.

Dum sia alloga prelego, rilate al la „Monda kulturo" li multon klarigis ĉefe responde al la demando: kion lernantoj devus konscii pri la diversaj mondkulturoj kaj ilia kontribuo al la hodiaŭa vivo?

Nia sperto organizi internacian lernejan retkunvenon en Esperanto fare de Emmanuel Desbrières, kiu naskiĝis en 1971 en Francio, kaj esperantistiĝis en 1992 en Dijono kaj reprezentis ILEI ĉe UNESKO en 2017. Li instruas geografion, historion, civitanan edukadon kaj eĉ iom pri Esperanto en liceo en Salins-les-Bains (Francio).

Li provis ne prelegi sed prezenti sian sperton organizi retkunvenojn inter gelernantoj el diversaj landoj, fakte gelernantoj de Peter Grebc (Slovenio), Elena Nadikova (Rusio) kaj Joël Muhire (Kongo) kaj respondi al la demandoj de la ĉeestantoj.

Virtualaj Esperanto-kursoj per Google Classroom: spertoj de brazila instruisto fare de Aristóphio Andrade Alves Filho, 63-jara brazilano, instruisto pri kemio kaj biologio kaj esperantisto de 1981. Li lernis la lingvon en la Universitato Federala de Cearao, UFC-Fortalezo. En 1990 li iĝis diplomita Cseh-instruisto en Hanabanilla, Kubo, kie okazis Cseh-seminario de IEI. Esperanton li instruas nuntempe nur virtuale pro la pandemio per Google Classroom kaj Google meet. Li estas ano de UEA, ILEI, BEL, BEJO kaj AAE (Alagoana Asocio de Esperanto).



Kiel li klarigis dum sia inspira kaj instrua prelego: en 2020, pro la pandemio, la ŝtataj lernejoj ĉe li elektis la platformon „Google Classroom" kiel Virtualan Lernejan Medion kaj instruis al la geinstruistoj uzi ĝin kaj ankaŭ „Google meet" por la sinkrona instruado.

Tiun sperton li profitis por la instruado de Esperanto. De majo 2020 ĝis nun li gvidas virtualajn kursojn.

Laŭ li kaj liaj spertoj, la platformo „Gugla Klasĉambro” estas tre taŭga por kursoj, ĉar tien oni povas alŝuti ĉiajn lernmaterialojn, kiuj restas je la dispono de la kursanoj kaj ili elektas la plej bonan horon por studi la lingvon kaj fari la hejmtaskojn.

Mia fleksebla kaj kelklingva metodo de instruado fare de Reza



Kheirkhah, irana esperantisto nun loĝanta en Tajvano, kiu universitate studis la anglan tradukadon. Kiam hazarde li renkontis Esperanton, li pensis, ke tio estas tiu lingvo, kiun li havas mision lerni kaj disvastigi. Li faris tion en gazetoj, kie li laboris dum multaj jaroj. Depost volontula laboro en la C.O. de UEA en 1989 ĝis nun, li daŭre instruis Esperanton (duon)profesie en Japanio, Koreio, Ĉinio, Vjetnamio ktp kaj nun faras tion en Tajvano, kie li ankaŭ redaktas la lokan gazeton *Formoza Folio*.

Laŭ la prelego, li multajn jarojn instruis en diversaj landoj ĉefe aziaj kaj ĉiam estis defio por li, kiel elekti la plej efikan metodon de la instruado. Dum paso de la tempo li lernis, ke estas neefike, almenaŭ en lia kazo, ĉiam fiksi la instru-metodon. Do, li decidis en ĉiu kurso fiksi la metodon nur post renkonto de la gestudentoj kaj eĉ foje dum pasado de la tempo li ŝanĝis tion aŭ eĉ uzis miksajn manierojn.



Laboro de Scio Sen Bariloj, sukcesa kurso en Benino fare de Mireille Grosjean (Svislando), kiu karakterizas sin kiel „Senrita emerito, multjara instruisto, babilema poligloto, senbrutara nomado”.

Ŝi diris, ke jam kvinfoje Scio Sen Bariloj (SSB) organizis SEVI-n, t.e. „SEminarion por VIrinoj”. Propono por 20 junaj universitatnivelaj virinoj en Kotonuo dum plena semajno, kiu estis sukcesa kurso, ĉar ĝi kongruis kun la bezonoj de tiuj partoprenantinoj.

La sperto de Mazaradelvalo fare de Bruĉjo Kasini (Italio).



Dum sia ege inspira prelego, Kasini diris, ke en 2012 la Itala Kongreso de Esperanto okazis en Mazaradelvalo, Sicilio. Ties urbestro, Nicolò Cristaldi, tre favore akceptis la proponon de italaj esperantistoj proponi kursojn de Esperanto en la lokaj lernejoj kaj efektive jam de januaro 2012 en 9 el la 13 lernejoj de la urbo komenciĝis kursoj, kelkkaze en la lernejaj horoj, alikaze en posttagmezaj kromhoroj. Sume, antaŭ la kongreso ricevis instruadon de Esperanto, en malsamaj kvantoj, pli ol 400 infanoj kaj junuloj. La instruadon li daŭrigis dum la sekvanta jaro. Ĝi estis haltigita poste fare de Itala Esperanto-Federacio, kiu fortimiĝis pro la kosto de tiu instruado en loko, kie stabila Esperanto-komunumo ne jam ekzistis.

La prelego kaj sekva diskutrondo provis klarigi la diversajn kulturajn kaj financajn aspektojn de la sperto, cele al laŭebla ripeto de similaj klopodoj. Ili devus esti bazitaj sur pli konkreta konscio de ebloj kaj ŝancoj, kiujn similaj malfermiĝoj de aŭtoritatoj povas liveri al nia movado.

3- Prelegoj pri interkultura kompetenteco

Krom diskutrondo specife pri la temo, ankaŭ jenaj prelegoj estis koncernaj al interkultura komunikado kaj/aŭ interkultura kompetento:



Sekvu Lisa por sperti ĉinan lingvon, kaj teo kaj interkulturo fare de Lisa Lin, Vicĝenerala sekretario de Tianjin-a Esperanto-Asocio (TEA) kaj iama ĝenerala sekretario de la ĉina filio de ILEI.

Ŝia prelego enhavis du partojn: la unua temis pri Teo kaj la Mondo, dum kiu ŝi diris, ke teo fakte naskiĝis en la antikva Ĉinio kaj poste komencis sian mirindan aventuron tutmonden, tiel, ke hodiaŭ en la mondo du trionoj de la homoj trinkas teon kaj 65 landoj produktas ĝin. Laŭ ŝi, teo, kiel Esperanto, havas spiriton de paco kaj te-amantoj kaj esperantistoj same havas idealon de paco, egaleco kaj harmonio.

La dua parto de ŝia prelego estis pri la ĉina lingvo sub titolo: „Sekvu Lisa por sperti ĉinan lingvon", dum kiu ŝi iomete instruis la lingvon montrante diversajn vortojn kaj frazetojn prononcante ilin kaj dirante iliajn signifojn en Esperanto.

Interkultura kompetento – kio ĝi estas kaj kion ĝi celas? fare de prof. Duncan Charters (Usono), prezidanto de UEA.
Dum sia instrua kaj vigla prelego li respondis ĉefe al la demando: Kiel la lernantoj akiru interkulturan kompetenton pere de Esperanto?

4- Prelegoj pri Esperanto kaj Esperantaj revuoj kaj literaturo

Ja ankaŭ en aliaj jam menciitaj prelegoj, iuj prelegantoj, kiel Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova, parolis pri Esperantaj revuoj, tamen la jenaj prelegoj estis specife pri Esperanto mem kiel lingvo kaj pri ĝiaj revuoj:

Imitindaj rezonadoj pri neologismoj inter Tibor Sekelj kaj Laŭlum fare de YU Jianchao (1956–) el Ĉinio, eksa ĵurnalisto de Ĉina Radio Internacia kaj prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio.

Kiel dirite en la prelego, neologismo estas diskutebla temo ĉiam atentata. Kiam ŝi legis verkojn de Tibor Sekelj, ŝi rimarkis, ke li multe enkondukis en sian skribadon vortojn el etnaj lingvoj, kun glosaro apendice. Ŝi rimarkis ankaŭ, ke dum la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento aperis artikoloj en la ĉina gazeto EPĈ (El Popola Ĉinio), kies ĉefredaktoro estis Laŭlum (Li Shijun), kiuj temis pri neologismoj uzataj de Tibor Sekelj. Ambaŭ diskutis pri neologismoj kaj donis tre bonajn ekzemplojn por plua esplorado. Ĉi-jare estas la 110-a datreveno de la naskiĝo de Tibor Sekelj kaj la 10-a datreveno de la forpaso de Laŭlum. La prelego omaĝis la jubileajn datrevenojn de ambaŭ karmemoraj eminentuloj.



Esperantonimoj fare de Marija Jerković el Kroatio, kiu loĝas en Zagrebo. Tie ŝi diplomiĝis ĉe la filozofia fakultato pri la angla kaj la kroata lingvoj kaj poste pri interlingvistiko ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando, kun tre bona noto. La alia preleganto estis Bruĉjo Kasini.

La prelego ĉefe temis pri prezentado de libro verkita de Marinko Ĝivoje *Esperantonimoj* (Patrolo 1973, Edistudio 1979, Edistudio 2020). Tiu libro, konata ankaŭ per la mallongigo „Onimoj", prezentas listojn de antonimoj, homonimoj, paronimoj, sinonimoj kaj vortludoj, kiuj aperas en Esperanto malgraŭ ĉiuj klopodoj de Zamenhof kaj de la postaj vortaristoj ilin eviti, por helpi „la leganton orientiĝi en la semantika labirinto de la jam tre abunda vortaro de Esperanto".

Prezentado de dulingva revuo *Espéranto-info*, interŝanĝo pri la rolo de gazeto kaj ideoj/revoj al la ideala internacia/denaska revuo fare de Céline Bernard (Francio), kiu redaktas kaj enpaĝigas la Esperantan revuon jam de pli ol dek jaroj.



Ŝi bone prezentis sian revuon Espéranto-info (ĉefe en la franca lingvo kaj parte dulingva) kaj proponis interŝanĝon pri la rolo de gazeto kaj ideoj/revoj al la ideala internacia/denaska revuo.

Kial legi literaturon, kaj literaturon en Esperanto? fare de prof. Duncan Charters, prezidanto de UEA.

Li ĝenerale parolis kaj pri literaturo kaj pri ĝia rolo por parolantoj de diversaj lingvoj, kaj specife pri la literaturo de Esperanto kaj ĝiaj funkcioj por la Esperanta komumumo, kiu loĝas dise tra la tuta mondo.

Ĉu plumo havas sekson? fare de verkistino Laure Patas d'Illiers.

5- Prelegoj pri Esperanto-ekzamenoj

Krom ampleksa prelego de d-rino Katalin Kováts, kiu prelegis pri KER-ekzamenoj kun titolo „Instruu kaj ekzercigu tutmonde" kadre de la ĉi-jara ILEI-Simpozio, okazis ankaŭ la jena interesa prelego:


Ekzamenoj KER kaj ILEI-UEA fare de Mireille Grosjean (Svislando).

En sia alloga prelego ŝi raportis pri la historioj kaj ekestoj de tiuj ĉi du ĉefaj ekzamenoj en Esperantujo kaj poste parolis pri iliaj similecoj kaj diferencoj, kie ili estas akceptataj aŭ validaj kaj kion ili ĝenerale enhavas.

6- Prelegoj pri grandaj personoj

Bildstrio Zamenhof-Biografio fare de Yanpetro Kavlan (Jean-Pierre Cavelan), franco naskiĝinta en Bretonio en 1943, laŭ kiu la celo de lia pentrado estas agrable esprimi sin, komuniki pli utile kaj preferinde per Esperanto kaj liberigi sian imago-povon, kio estas la plej riĉa luksaĵo por li.

Li parolis ĉefe pri sia projekto de bildrakonto de la vivo de Zamenhof en formato adaptita al la nunaj poŝtelefonoj, montrante paĝojn de sia retejo https://www.yanpetro-kavlan.fr/.



Memoro de Antonietta Bernardoni fare de Ermanno Tarracchini (Italio), kiu diplomiĝis pri biologiaj sciencoj kaj specialiĝis pri subteno de handikapuloj. Li estis instruisto de mezlernejo kaj ĉe Universitato de Modeno kaj Reggio Emilia. Trejnita pri neŭro-pedagogio de mensa aktivado en Parizo, li partoprenis dum tridek jaroj en la asembleoj de Popola Terapiista Agado de Antonietta Bernardoni. Li engaĝiĝas pri intensa informado por malpsikologiigi kaj sen-medicinigi la lern- kaj kresk-procezojn en infana kaj adoleska aĝoj. Li estas membro de pluraj sciencaj fakaj komitatoj de asocioj kiel APEI (Asocio de Italaj Pedagogoj kaj Edukistoj) kaj ILEI.

Li parolis pri Antonietta Bernardoni, por kiu la studado de lingvoj estis tre grava. Ŝi lernis la germanan, kiam ŝi estis ankoraŭ tre juna kaj tio ebligis al ŝi, pli poste, savi partizanojn de certa ekzekuto fare de la germanoj … Ŝi ankaŭ lernis la anglan, la francan kaj la rusan. Ŝi kuraĝigis nin formi studgrupojn por lerni naciajn lingvojn kaj, en la sekvaj jaroj, ankaŭ signolingvon kaj Esperanton.

D-ro Bernardoni opiniis, ke multaj problemoj kaj konfliktoj estas antaŭ ĉio miskomprenoj kaj problemoj ankaŭ ligitaj al komunikaj malfacilaĵoj inter vivantaj estaĵoj. Do, ŝi proponis, ke ni studu precipe du lingvojn: signolingvon por komunikado kun surduloj kaj Esperanton kiel neŭtralan lingvon kaj lingvon de paco, komunikan ponton inter la diversaj popoloj de la Tero.

Mia amikeco kun Tibor Sekelj fare de Spomenka Štimec, kroata verkistino, tradukistino, instruistino de Esperanto kaj iama sekretariino de la Esperantlingva Verkista Asocio (EVA). Ŝi estas konata interalie pro sia verkado de originalaj Esperantaj libroj. Ŝi nuntempe estas ano de la Akademio Literatura de Esperanto kaj loĝas en bieno en Kroatio.

Okaze de la 110-a datreveno de la naskiĝo de Tibor Sekelj, ŝi prelegis pri sia amikeco kun Tibor kaj prezentis sian novelon pri li titolitan „La ŝipo nomata Teresa”.

Memoro al Pedro Aguilar Solà fare de Laura Brazzabeni, kiu enkondukis kelkajn el liaj gelernantoj: Alessandra Madella, Gian Antonio Pfleger, Paolo Scotti kaj Debora Rossetti. Ili parolis pri sia ŝatata instruisto.

Laŭ ili, Pedro Aguilar Solà estis tre grava instruisto en Italio kaj ili ŝuldas al li multe da bonaj ideoj pri efika instruado de la lingvo. Gestudentoj de lia lasta prepar-kurso por la ekzameno de la tria-grada nivelo en Italio dankeme memoris tiun ĉi elstaran instruiston.

Rilate al la Virina Tago kaj Virina Agado okazis kelkaj programeroj en vendredo de 8:30-12:30 UTC kun organizado kaj enkonduko de Małgosia Komarnicka. Jen du el ili:

Omaĝo al Claude Nourmont fare de Emmanuelle Richard

Prelego pri la karmemora Claude Nourmont (1945-2022), franca instruistino kaj esperantistino, loĝinta en Luksemburgo, honora prezidanto de TEJO, redaktoro de Monato (rubriko Arto) de 2005 ĝis 2022, kaj vicprezidanto de UEA de 2004 ĝis 2013.

La 8-minuta registrita prelego de Emmanuelle Richard estis preparita okaze de la Virina Tago.

Ada, la Esperantistino fare de Gian Carlo Fighiera.

Oni spektigis registraĵon de voĉlegado de teksto pri Ada Fighiera-Sikorska (1929-1996), pola ĵurnalistino, kiu pasigis multajn jarojn en Italio kaj de 1962 ĝis sia morto estis la redaktorino de la „La plej ofta internacia gazeto de la Esperanto-movado", *Heroldo de Esperanto*. La teksto estis verkita de Gian Carlo Fighiera (1929 -), itala esperantisto kaj ŝia edzo. La tekston voĉlegis Andreo Bach.

7- Prelegoj pri diversaĵoj

Jen prelegoj, kiuj ne klasigeblas en la supre menciitaj kategorioj:

Preparado de homa ĉeno fare de Max Garcia (Hispanio) aŭ Maximiliano Garcia, kiu estas hispandevena svisa inĝeniero kaj komercisto. Kiel poligloto li parolas ok lingvojn kaj estas filmprodukisto de la animaciaj filmoj kaj libroj *Savu la Planedon kun Kungfua Kunikleto!*. Li reprezentis ILEI ĉe UNESKO en Parizo en 2021.

Laŭ li, ILEI kunligas instruistojn, lernantojn, studentojn, instruemulojn kaj lernemulojn el la tuta mondo. Li sugestas: „Ni klopodu vide montri tion per la realigado de instrua homa ĉeno. Venu kaj malkovru kiel vi povas helpi nin fari tion!" Ĉi tie vi povas spekti la frukton de lia ĝisnuna projekto: https://www.youtube.com/watch?v=bPVxzp1Iw_M.



La ĉina kaj Esperanto en NAJBAROJ de Norman McLaren fare de Alessandra Madella, doktoro pri komunikaj studoj ĉe la Universitato de Iowa (USA) pere de disertacio pri la filmo „Hiroshima, mon amour". Ŝi instruis Mondan Filmhistorion ĉe la Artkolegio de Kunming (Ĉinio) kaj verkis eseojn pri la filmistino Ulrike Ottinger.

Rilate al Kebekio, la estunta kongresurbo por la nuna evento, ŝi parolis pri la uzo de la ĉina kaj Esperanto en la Oskar-premiita mallonga animacia filmo Najbaroj (Neighbours/Voisins) kreita de Norman McLaren por la Nacia Filmoficejo (National Film Board) de Kanado en 1952.



Serĉante ŝanĝon 'En kiu arbusto kuŝas kuniklo'? Fare de Martina Kvarantan Šmitran, prof. soc. ped. kaj NLP-trejnisto (Neŭrolingvistika programado), kroata esperantistino kaj patrino de kvar infanoj. Ŝi kontribuis al la virtualaj programoj kiel la Tago de Lernado en UK-2021 kaj dum VEKI-2. Pri sia fako NLP ŝi verkis tri librojn (kaj la kvara survojas). Ŝi estas ankaŭ la aŭtoro de fabellibro por infanoj.

Ŝi komencis la prelegon dirante ke: „Ĉiu sukcesa homo havas klarajn celojn. Sen klare fiksitaj celoj, la sukceso estas mizer-probable atingebla. Havi celojn liberigas niajn energion kaj mensajn kapablojn. Se antaŭ ni staras klara celo, ni ne povas ne atingi ĝin. Ju pli klara kaj detala la celo, des pli alta la grado de ĝia atingeblo".

Dum la prelego, ŝi prezentis kelkajn instigajn demandojn kaj proponojn, kiuj povas helpi por pripensigi ĉiujn rilate al sia(j) celo(j).

Komunikado kaj genra fokuso en Latin-Ameriko fare de Maritza Gutiérrez (Kubo), kiu diplomiĝis pri ekonomiko en 1983 en la Havana Universitato. Ŝi ekstudis Esperanton en 1979 kaj poste fariĝis membro-fondinto de KEA. Ŝi estas ankaŭ membro de la Akademio de Esperanto.

Bedaŭrinde, pro retkonekta problemo, ŝi ne sukcesis prelegi, sed ŝi volis prezenti ĝeneralan bildon, kiu celas proksimiĝon al la situacio de komunikado kun genra fokuso en Latin-Ameriko. Laŭ la statistikoj de regionaj organizoj ĉe UN kiel CEPAL, Latin-Ameriko posedas atentindajn indikilojn pri genra perforto, kio evidentigas la bezonon pritrakti ĝin ankaŭ

en la pedagogiaj medioj kaj komunikmodeloj, kiuj estigu pripenson kaj debaton diverstemajn kunlig al genraj kategorioj.

Pri la cirila alfabeto kaj ĝiaj kreintoj fare de Auderskaja Tatjana Viktorovna, kiu naskiĝis kaj loĝas en la urbo Odessa. Ŝi estas biologo. Ŝi estas aŭtoro de 3 libroj: *La mondo en guto da akvo*, Impeto, 2010, Moskvo; *Intelektaj amuzoj. Lingvaj ludoj en Esperanto*, Mondial, 2016, Novjorko kaj reta ruslingva libro *Populariga rakonto* (ĉ. 1000 vortoj, ĉ. 15 min.) pri kreintoj de la slava alfabeto, la fratoj-monaĥoj Cirilo kaj Metodo. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto.

La aventuroj de saĝa steleto kaj de la mirinda teamo fare de Alessandra Madella. Antaŭ ol spektigi la belan kaj laŭditan animacion, la aŭtorino enkonduke klarigis diversajn aspektojn de la animacio.

Kiel publikigi en Esperantujo fare de Emmanuelle Richard.
Dum pli-ol-hora registrita prelego, Emmanuelle ege detale kaj amplekse klarigis la neimageble multajn kaj divers-specajn etapojn, tra kiuj devas pasi ĉiu, kiu volas sukcese publikigi ion en Esperant(uj)o.

AMO-Seminario 89

Kadre de VEKI-3 okazis ankaŭ sesio de AMO-Seminario. Mireille Grosjean laŭplane volis prelegi pri „Juna Amiko, la 'juvelo' de ILEI: enhavo, skipo, eldonlinio kaj defioj por ĝia estonteco", tamen pro eka malsaniĝo, bedaŭrinde, ŝi ne povis tion fari kaj sekve la respondeculo de AMOj, Stefan MacGill, mem prezentis ŝiajn tekston kaj preparitajn bildojn aldonante siajn parolojn speciale pri la tempo, kiam li estis la ĉefredaktoro de JA. Lian interesan prezentadon pliriĉigis bilde kovrilpaĝoj de la unuaj kaj jubile-jaraj numeroj de JA, kiujn elektintis Mireille.
Poste Stefan MacGill prezentis sian planitan prelegon „La landa agado de UEA kaj ILEI", dum kiu klarigante pri ambaŭ organizoj kaj iliaj laŭlandaj aktivadoj, li prezentis ankaŭ siajn konsilojn kaj proponojn por plimultigi kaj pli multe aktivigi la landajn agantojn.
La fina kaj ege alloga prelego de la ĉi-jara AMO okazis fare de Guglielmo Martelli pri „Vasta lerneja projekto", kiu proponas Esperanton por faciligi la trejnadon kaj dungadon de teknikistoj kaj vendistoj de enpakigaj maŝinoj. La prelego prezentiĝis itallingve kaj Alessandra Madella interpretis ĝin sinsekve, kiam ŝi estis fizike ĉe la preleganto. Martelli, kiu estis ministro de la liliputa sendependa regno nomata „La Insulo de la Rozoj" (1968), kies

oficiala lingvo estis Esperanto, parolis pri sia nova projekto por konkeri la mondon pere de Esperanto.

ILEI-Simpozio

Dum la lastaj du tagoj de VEKI-3, okazis ankaŭ impona ILEI-Simpozio kun 13 sciencaj prelegoj.

Vendredon, la 29-an de julio, ekde la 12:30-18:00 UTC okazis 6 interesovekaj prelegoj kaj sabaton, la 30-an ekde la 11:30-16:00 UTC okazis 7 atentokaptaj prelegoj. Pri la Simpozio aperos aparta raport-artikolo en IPR. La ĉefa respondeculo kaj organizanto de la ILEI-Simpozio estis prof. Fernando Pita, ILEI-estrarano pri IPR, universitata kaj scienca agadoj kaj observanto de ILEI ĉe TEJO.

Koncertoj

Kiel en antaŭaj jaroj, ankaŭ al la ĉi-jara VEKI ne mankis arta parto: jen koncertoj, kiuj okazis dum la evento laŭ la tagoj:
La 23-an de julio ekde la 19.00: Sepa kaj Asorti
La 24-an de julio ekde la 19.00: Chiara Raggi
La 25-an de julio ekde la 19.00: Clarissa Sabatini
La 26-an de julio ekde la 19.00: Piero Nissim
La 27-an de julio ekde la 19.00: Anjo Amika
La 29-an de julio ekde la 16.00: Ĵomart kaj Natasha



La artistojn prezentis Laura Brazzabeni, kiu kiel ILEI-estrarano pri kongresoj faris la plej multan laboron por organizi kaj okazigi VEKI-3 kun helpo de ĉiuj aliaj ILEI-estraranoj, precipe Alessandra Madella kaj Fernando Pita.

La Ferma Tago

En la lasta tago de VEKI-3, t.e. sabato, la 30-a de julio, post la dua parto de la ILEI-Simpozio, okazis prezentado de la venontjara 56-a ILEI-Kongreso kun paroloj kaj klarigoj de Laura Brazzabeni, Brunetto Casini, Enrico Borrello kaj Alessandra Madella.
La Kongreso okazos hibride en Lignano Sabbiadoro (Esperante: Linjano Or-sabla), Italio; dum la sama semajno (5a-12a aŭgusto 2023) okazos ankaŭ TEJO-Kongreso (IJK) en la sama loko.

Post tio la Kongreso VEKI-3 anonciĝis fermita post semajno da belaj kaj memorindaj renkontiĝoj kaj bonaj prelegoj.

Impresoj de kelkaj partoprenintoj de VEKI-3

Mi ĝojis pro la eblo sekvi la ĉi-jaran kongreson de ILEI virtuale, ĉar ĉeeste mi ne povus partopreni. Sekvante la plejparton de la programeroj – inkluzive la Simpozion – mi ĝuis la ege bonkvalitan organizon, la buntajn, interesajn programerojn ... kaj renkonti – kvankam nur virtuale – elstarajn esperantistojn, karajn geamikojn, konatojn...

Por mi tre valoraj estis la prelegoj pri instru-projektoj, -metodoj kaj -spertoj, samkiel pri ekzamenoj. Emocie kaj pensige influis min la rakontoj pri edukado de denaskulo(j) (Trevor Steele, Ankica Jagnjić). Kiel membro kaj sekretariino de la E-societo „Tibor Sekelj" en Subotica (Serbio), mi same ĝojis pro la 2 prelegoj (de Spomenka Štimec kaj de Yu Jianchao) pri Tibor Sekelj, en la jaro de la 110a datreveno de lia naskiĝo.

Dankegon kaj laŭdon al la organizintoj, prelegintoj kaj aliaj kontribuintoj!

Aranka LASLO (Subotica, Serbio)

VEKI -3 estis tre granda sperto por mi. Mi aliĝis al la 55-a ILEI- Kongreso, tamen poste evidentiĝis, ke al mi ne eblas vojaĝi al Kanado. Do virtuala kongreso estis taŭga solvo, kiun mi ĝis la lasta tago povis eluzi.

Kun granda plezuro mi revidis konatajn geinstruistojn de Esperanto kaj gesamideanojn, kun kiuj mi havis kaj daŭre havas amikajn rilatojn. Sed aperis ankaŭ novaj vizaĝoj, kiel ekzemple tiu de la japana Nitta Takamichi, la gajninto de la Premio Maŭro La Torre 2022.

Tre interesa estis tio, kion rakontis al ni Jozefo Németh dum sia prelego: „IPR: hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ".

Fascinis nin profesoro Fabrizio Angelo Pennacchietti el Torino, kiu parolis dum la unua tago de la Simpozio pri: „Esperanto, valora instrumento por 'lingva higieno'".

Tre riĉa estis la tuta programo de VEKI-3: prelegis 33 homoj kaj okazis 10 diskutrondoj. La vesperaj programoj regule finiĝis per koncertoj kaj ni povis aŭskulti tiujn de Chiara Raggi, Clarissa Sabatini, Piero Nissim, Anjo Amika kaj de la du grupoj „Sepa kaj Asorti" kaj „Jomart kaj Natasha".

Elkore mi dankas al la organizintoj de tiu ĉi vere tre sukcesa 55-a ILEI-Kongreso.

Luigia OBERRAUCH, estrino de la itala ILEI-sekcio

Mi multe ĝuis VEKI-3, precipe la diskutrondon pri UNESKO, kiu donis al ni la ŝancon aŭskulti la valorajn komentojn de delongaj spertuloj, lernante el ilia vasta superrigardo pri la rilatoj inter organizoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Esperanto-asocioj. Mi ankaŭ multe ĝojas, ke ni sukcesis lanĉi la „homan ĉenon" (https://www.youtube.com/watch?v=bPVxzp1Iw_M). Temas ne nur pri ludo, sed pri la ŝanco malstreĉe lerni uzi vidajn teknologiojn, kiuj estas tiel gravaj nun en la laboro de instruistoj kaj kiuj povas certe helpi nin pli multe partoprenigi junulojn en la vivon de nia Ligo.

Maximiliano GARCIA (Svislando/Hispanio)

La decido kongresi virtuale estis bona decido. La tempo de la interkontinentaj flugoj kaj de la mondaj kongresoj estas finiĝanta pro pluraj kialoj [interalie pro la klimata varmiĝo]. Unu kritiketo: la programo estis tro riĉa. Mi volas diri, ke prelegoj sekvis unu la alian dum tuta semajno. Se oni estas hejme antaŭ la komputilo, oni ne povas antaŭvidi, ke homoj sukcesas resti gluitaj al sia ekrano la tutan tagon. Iom malpli intensa programo estus preferinda, sed enhave la kongreso estis tre stimula.

Renato CORSETTI

Afrikanoj esprimis sin okaze de VEKI-3 la 27-an de julio 2022

Estis momento merkrede dediĉita al Afriko, kontinento agema kaj vigla en la Esperanto-Movado. Mi povis informi diversajn samideanojn tie kaj tri partoprenis, havis tempon kaj retaliron en tiu horo. La proponita temo estis: ĉu la kontaktoj per Esperanto havas alian guston ol iuj kontaktoj, kiujn afrikanoj povas havi tra la mondo per WhatsApp ekzemple?

Komencis paroli Alfred Arthur Gobina el Ganao. Li klarigis, kiel li uzas WhatsApp por kompletigi siajn kursojn, rilati kun siaj gestudentoj, respondi al iliaj demandoj inter la kunvenoj, flegi la kontaktojn kaj kuraĝigi ilin. Poste venis tiu kerna demando: kiel vi sentas la kontaktojn tutmondajn, kiam ili okazas per nia kara lingvo Esperanto? Alfred Arthur Gobina tiam parolis belege, li insistis pri tuja amikeco kaj forta fido. Sekvis Gilbert Ndihokubwayo el Burundo. Li esprimis samopiniadon kun Gobina: regas fido inter esperantistoj, frateco, amikeco. Assane Faye el Senegalo aperis skribe kaj substrekis la valoron de tiaj kontaktoj.

Mi faris mallongan enkondukon prezentante la „mezepokan” tempon, kiam afrikanoj lernis Esperanton per leterointerŝanĝoj kun eŭropanoj, ĉefe kun Hans Bakker, Renato Corsetti kaj Germain Pirlot. Mi skizis la karieron de Privas Tchikpe el Benino, la unua esperantisto de tiu lando. Mi tiumomente ne memoris la nomon de lia instruisto: temis pri Germain Pirlot.

La tuta debato spekteblas en Jutubo, en la kanalo UEAviva; nepre spektu ĝin, ĝi estas mirinde bela kaj ĝojigos vin.

https://www.youtube.com/watch?v=DHdWT3tKJlI&t=17855s

Tie vi trovos longan filmon pri la tuta VEKI-a tago 27-a de julio. La debato de afrikanoj spekteblas tutkomence.

Mireille GROSJEAN

Salutmesaĝo de UEA al la 55-a Kongreso de ILEI, VEKI-3, 2022-7-23



Karaj kolegoj instruistaj, instruantaj kaj interesitaj pri la lernado de Esperanto,

Estas kiel ĉiam plezuro por mi saluti renkontiĝon de ILEI, ĉi-foje la trian virtualan kongreson aŭ konferencon kaj simpozion, ĉar por Universala Esperanto-Asocio unu el la ĉefaj celoj kaj respondecoj estas certigi kaj ĝoji, ke ĉiam pli da personoj lernos Esperanton.

Antaŭe oni parolis pri instruado kiel ĉefa celo, sed hodiaŭ evoluis la pensado inter edukistoj, ke jes, la plej kerna fokuso estu la lernantoj, iliaj bezonoj kaj jam deciditaj deziroj, pli ol instruado kaj la bezonoj de instruistoj. Nur per tiu fokuso ni allogos sukcese ĉiam pli da ĝuantoj de nia lingvo. Tamen kiuj subtenos ilin, kiuj preparos la vojon por tiu atingo? Jes, la informantoj, ĉu unue pri la ekzisto kaj utilo de Esperanto, ĉu poste pri efikaj lernorimedoj por kie ajn troviĝas niaj estontaj lernantoj. Tamen por inspiri niajn lernantojn kaj pliefikigi ilian lernadon, por ke Esperanto estu ne malhavebla instrumento en ilia ĉiam pli liberiĝanta mondperspektivo, ni bezonas vin, instruistojn, instruantojn, gvidantojn, lingve kaj kulture familianojn kiuj kuraĝigas, donas ekzemplojn kaj montras la vojon al pli plenumita vivsperto.

Post malpli ol tri horoj okazos interaga diskuto gvidota de reprezentantoj de ILEI, UEA kaj TEJO. Tio spegulas la fakton, ke por atingi niajn celojn ne sufiĉas izolita agado de tiuj tri kolonoj de la movado. UEA engaĝiĝas pri strategia planado, reliefigota en la Universala Kongreso en Montrealo. Necesas longdaŭra planado pri tio, kiel krei junajn gelernantojn de nia lingvo, ĉu en lernejoj, kie ni havas ĉiam pli da ŝancoj konvinki pri la valoro de Esperanto enkonduke al lingvolernado kaj interkultura kompreniĝo, ĉu en universitatoj, kie kreskas intereso pri esploroj Esperanto-rilataj kaj eksperimentaj klas-interŝanĝoj, ĉu por hejmlernado (nur en Usono du milionoj da hejmlernantoj), ĉu en retaj lingvolernejoj kiel Duolingo, ĉu en poliglotaj renkontiĝoj, ĉu per individuaj kontaktoj kaj interesiĝo por pli vasta diskonigo de nia lingvo en amaskomunikiloj. Ni kunigu la fortojn, komprenu pli bone la defiojn, utiligu pli efike niajn iniciatojn kaj apliku la sukcesajn aliloke. Ekzemploj estas la ideo 'Amikoj de Esperanto' de Adonis Saluba en Brazilo kaj la sekvaj kursoj por interesitoj kiel tiu gvidita de la Kolombianoj, rezultiganta pli da membroj de TEJO kaj UEA. La nunaj iniciatoj en italaj lernejoj kaj planado por kongresoj venontjare en Italujo, kie ILEI kaj TEJO renkontiĝos kune post la Universala Kongreso en Torino. Pozitivaj reagoj al letero de nia Seán O' Riain sendita al 200 diplomataj kolegoj indikanta la valoron de Esperanto kiel enkonduko al pli vasta lernado de la franca lingvo, kiun celas la irlandanoj, pro la pli grava pozicio de tiu lingvo kompare kun la angla post la Briteksiĝo (Briteliro) el Eŭropa Unio kaj la akcelilo por multlingveco, lastatempe vaste diskonigita de la francoj en lernejaj rondoj.

Precize pro tio gravas nia temo „Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado". Kiel evidentiĝis en la ĉi-monata forumo organizita de niaj reprezentantoj kiel flank-evento okaze de konferenco de Unuiĝintaj Nacioj, urĝas sendiskriminacia edukado de infanoj ne nur en unu aŭ du oficialaj lingvoj de ilia nacio, kiuj povas esti tute fremdaj al la ĉiutaga hejmlingva uzado, sed en iliaj indiĝenaj lingvoj kun aliro al aliaj lingvoj gravaj por progreso en la socio.

Esperanto povas esti utila lingvokonsciiga kaj kulturvastiga instrumento por faciligi la edukajn celojn de nediskriminacia lingvolernado por infanoj de ĉiuj etnaj grupoj kaj sociaj tavoloj. En emocia parolado dum tiu forumo de UN, Doktorino Xolisa Guzula de la eduka fakultato en la Universitato de Kaburbo en Sud-Afriko diris la jenon: „La Kaburba Universitato, kiun mi sopiras vidi, ne devigos min paroli la tutan semajnon nur en la angla lingvo por esti akceptita kiel intelekte egala al ĉiuj aliaj. Mi antaŭvidas

universitaton senigitan de koloniismo, kiu ne primokos min, kiam mi prezentos mian esplorstudon en IsiZulu, kun citado de esploristoj de la Universitato de Kwa-Zulu Natal.”

Ni havas fortajn aliancanojn, kiuj bezonas nian helpon por konsciigi la mondon, ke dulingvismo, plurlingvismo en edukado estas por multaj egaliga kaj liberiga beno, ne forigenda ŝarĝo al la eduksistemo. Esperanto povas helpi malfermi la pordojn al lernado de tiuj lingvoj, kiuj spegulas la kulturan heredaĵon de la popolo, kune kun pli vastaj kontaktoj kaj mondperspektivo, tiel faciligante la kapablon lerni tiujn aliajn lingvojn, kiuj gravas por la lernantoj, mem elektontaj ilin laŭ persona intereso kaj profesia utilo.

Antaŭ jardekoj konata usona ĵurnalisto kaj publika parolanto lernis Esperanton en sia lernejo. Li poste interesiĝis pri la itala kulturo, ĉar li fakstudis pri literaturo, arto kaj muziko por esti pli bone informita por sia ĵurnalisma profesio. Li konfesis al mi, ke la enkonduko al lernado de Esperanto donis al li la necesan preparon kaj fidon, ke li kapablas lerni la italan. Li tion faris, kaj en la dua parto de sia vivo fariĝis instruisto kaj preleganto en la itala lingvo en Romo kaj aliloke. Esperanto faciligis al li pli vastan mondperspektivon kaj pli plenumitan vivkarieron, pro kio li ĉiutage dankis la klarvidon de sia lerneja instruisto de Esperanto. Ni konsciu la benon, kiun ni kapablas donaci al la mondo, kaj la mondo interŝanĝe helpos al ni diskonigi la lingvon kaj idealojn, kiuj konstruos novan, pli kompreneman kaj pli pacan mondsocion.

Mi deziras al ĉiuj bonan laboradon kaj ĝuadon de VEKI-3 de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Duncan CHARTERS, Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio

Realaj spertoj el virtualaj eventoj



de Radojica PETROVIĈ (Serbio)

La Esperanto-komunumo, kiu plej videblas kiel diasporo kaj tra sia kongresa turismo (esperantistaj kongresoj, konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj kaj periodaj klerigaj eventoj) pruvis sian viglecon en la pandemiaj cirkonstancoj de tre limigita ebleco de vojaĝoj kaj amaskunvenoj. Transiro al virtualaj renkontiĝoj per uzo de disponeblaj informkomunikaj

teknologioj (IKT) montriĝis neevitebla kaj sava. La uzo de IKT por E-movadaj bezonoj ne aperis kiel pandemia novaĵo, sed la pandemio pli amase kaj konvinke elmontris la potencon kaj gravecon de la IKT-rimedoj kaj metodoj. Tiel akiritaj spertoj havos longdaŭran efikon kaj aplikon postpandemie, post kiam la homaro kaj la koronviruso atingos la biologian packontrakton pri plua kunvivado.

Retinarioj, retkursoj kaj neĉeestaj ekzamenoj

La retkunsida platformo de Zoom[2] (Zumo) montriĝis la plej populara programaro por organizi retkursojn de Esperanto, neĉeestajn ekzamenojn kaj diverstemajn retseminariojn kun esperantistaj prelegantoj interpretataj alilingve por neesperantistaj aŭskultantoj. Ĝi ne nur certigas adaptiĝon al la postulo de kontraŭepidemia distanco inter la partoprenantoj, sed ankaŭ ebligas samtempan partoprenon kaj rektan komunikiĝon de foraj kunsidantoj, kaj ĝuon de instruo de foraj instruistoj sen vojaĝ- kaj restad-kostoj – avantaĝo spertita ankaŭ antaŭe, kiu tamen nun montris sin en plena lumo. Kaj pli: filmitaj prelegoj kutime restas konservitaj kaj reuzeblaj ĉe Youtube (Jutubo) aŭ aliloke nube.

Alia kaj multe pli servema platformo uzata por retkursoj de Esperanto estas Google Classroom[3] (Gugla Klasĉambro) subtenebla per Google Meet, WhatsApp, Viber k.s. Eĉ plian kursadministran komforton kaj lernefikecon certigus alia, malfermkoda lernmastruma sistemo, ekz. Moodle[4], aŭ iu lern-enhavmastruma sistemo[5], ne grave ĉu por la pandemiaj aŭ senpandemiaj cirkonstancoj.

Malferma kaj interaga lernado

Disponeblo kaj atingeblo de studmaterialoj, lernrimedoj kaj lernaktivaĵoj estas sojla faktoro de sukcesa kaj plezuriga instruado kaj lernado. Retrimedoj abunde kaj malmultekoste subtenas tiun bezonon kaj ebligas la t.n. malferman lernadon, en la senco, ke la lernmedio kaj lernmetodoj restas malfermaj por diversaj cirkonstancoj kaj bezonoj de la lernantoj, inkluzive de tempodispono, lernstilo kaj progreskapablo. Tio signifas senliman disponeblon ankaŭ ekster la programitaj leciontempoj, adaptitajn

[2] https://zoom.us/

[3] https://edu.google.com/workspace-for-education/classroom/

[4] https://moodle.org/

[5] https://xyleme.com/what-is-an-lcms/

kromaktivaĵojn, ekzercojn, atelierojn, diskutrondojn. En tia organizo, la interaga kaj kunlabora lernado povas doni sian plenan pedagogian kontribuon.

Virtualaj kaj hibridaj kunsidoj

Transpontado de geografiaj distancoj, ŝparo de vojaĝ- kaj restad-kostoj kaj pliefikigo de la organiza laboro per uzo de retkunsidaj platformoj klare evidentiĝis tra virtualaj kunsidoj de gvidorganoj kaj diversaj labor- kaj interes-grupoj. Pli libera interpreto kaj kontrolata apliko de voĉdonproceduroj kun uzo de efikaj kontrolrimedoj ebligis plian demokratecon kaj egalrajtecon por ĉiuj partoprenantoj sendepende de la ekonomia riĉeco kaj vojaĝkapablo. La spertoj el hibridaj eventoj, kun egalrajtaj ĉeesta kaj distanca partopreno, estas vojmontraj por la estonteco sendepende de ekzisto aŭ neekzisto de pandemiaj aŭ aliaj limigaj faktoroj.

Problemoj kaj malavantaĝoj

Ĉi-antaŭe estas menciitaj kelkaj avantaĝoj kaj konvenoj de retaj eventoj, pri pliaj ankoraŭ eblas diskuti, sed nepras priatenti ankaŭ problemojn kaj malavantaĝojn de tiaj agadmedioj kaj komunikvojoj. Rekta interparolo vizaĝ-al-vizaĝe certe estas pli agrabla kaj pli konvena por bona interkompreniĝo ol tra ekrano kaj aŭskultiloj. Teknikaj problemoj, komunikobstakloj kaj manko de teknikaj spertoj de iuj partoprenantoj povas fari la situacion eĉ pli ĝena.

Se preleganto ne aperas rekte, sed lasas reprodukti filmitan prelegon, malaltkvalite registrita sono kaj malklaraj bildoj povas tute ruinigi la prelegon kaj malagrabligi la travivaĵon. Kelkfoje, por kultura programo, oni aranĝas komunan spektadon de jutubaj videaĵoj anstataŭ viva prezento de partoprenantaj artistoj. Tio kelkoble malaltigas la belartan valoron de prezentataj pecoj.

La interkulturaj aspektoj ludas gravan rolon. Diverseco de komunikstiloj kaj kondutnormoj bezonigas atentan antaŭpreparon. IKT, jes ja, transpontas geografiajn distancojn, sed ne la tempajn diferencojn: la 16-a horo laŭ UTC same malsamas en Eŭropo, Sud-Ameriko kaj Orienta Azio ĉu kun ĉu sen IKT.

La financa aspekto ne neglekteblas. Zumo kaj aliaj programoj haveblas senpage, tamen kun limigitaj ebloj kaj kvalito: limigitaj nombro de samtempaj partoprenantoj kaj daŭro de sesio, limigita aŭ nenia ebleco de

plurkanala interpretado en diversaj lingvoj. Pli fajnaj versioj solvas tion, sed kostas.

VEKI-3 kaj la virtuala ILEI-simpozio

Ĉi-jare ILEI kongresis virtuale la trian fojon sinsekve. Ĝis tre proksime antaŭ la planita komenco de la kongreso ni esperis havi ĉeestan kaj hibridan eventon – kun ebla virtuala partopreno. Tamen estis tro malmultaj aliĝintoj, pro kompreneblaj kialoj, kaj tio kaŭzis ŝanĝon al plene virtuala renkontiĝo. Necesis en mallonga tempo ŝanĝi la preparplanon kaj programskemon, trovi prelegontojn kaj diskutgvidontojn, varbi partoprenontojn, certigi teknikan subtenon inkluzive de viva elsendado tra Jutubo. Kaj… la gratulinda organiza teamo, gvidata de la estrarano pri kongresoj, sukcesis. La kongresa temo kaj koneksaj demandoj estis abunde traktataj simpozie kaj ekstersimpozie, diskutrondoj kaj laborgrupoj traktis temojn el la vivo kaj estonteco de ILEI, ne mankis distra programo, aperis altvaloraj prelegoj kaj alitipaj kontribuoj de renomaj fakuloj kaj artistoj, kiuj verŝajne ne povus partopreni en la evento ĉeeste pro neeblo kovri la partoprenkostojn aŭ pro aliaj kialoj.

Kaj plu?

La akiritaj spertoj analizendas por celtrafa apliko al organizado de venontaj eventoj kun plia varieco de rimedoj kaj metodoj laŭ bezonoj kaj konvenoj de pli vasta partoprenantaro.

Premio La Torre 2022 estis aljuĝita al Nitta Takamichi



La gajninto de la tria eldono de Premio La Torre (post 2015 kaj 2018) estis Nitta Takamichi el Japanio. La titolo de la brila esplor-raporto estas „Instrumetodo por Esperanto-kurso bazita sur metakognado kaj aktiva lernado”.

La ceremonio por la premio okazis dum VEKI-3 (la 3-a Virtuala Kongreso de ILEI), dimanĉon la 24-an de julio 2022, kun prelego de Renato Corsetti pri la karmemora profesoro Maŭro La Torre kaj kun la ĉeesto de la reprezentantoj de familio La Torre kaj de la internacia ĵurio, kiu konsistis el Ahmad Reza Mamduhi, Renato Corsetti, Xiaofeng Gong (Arko), Elisée Byelongo, Giridhar Rao, Dennis

Keefe kaj Alessandra Madella. Dum la ceremonio, oni legis la raporton de la ĵurio: (vidu ĝin post tiu ĉi artikolo). Sekvis unu-hora prelego de Nitta Takamichi pri siaj esplorado kaj instrumetodo, kiun la ĉeestantoj sekvis kun multe da intereso kaj estas nun sendube klopodantaj adapti al siaj lokaj Esperanto-kursoj.

Laŭ la reguloj, la gajninto de la Premio devas sendi sian esplorraporton en minimume 8 kopioj al Esperanto-bibliotekoj por la programo „Ni savu niajn semojn" de ILEI. Ĉi-foje estis interkonsentite, ke parto de la bibliotekoj akceptos la ciferecan version de la laboraĵo. Entute la raporto iros al la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia de La-Chaux-de-Fonds en Svislando, al Aŭstria Nacia Biblioteko, al Esperanto-Centro en Herzberg-am-Harz, al la biblioteko de Massa en Italio, al la Dokumenta Esperanto-Centro de Kroatio, al la biblioteko de IrEA kaj al la biblioteko de la Universitato de Espero de DR Kongo. Kontaktoj estas prenitaj ankaŭ kun la biblioteko de Brazila Esperanto-Ligo por ebla papera sendado. Do, la esplorraporto iros al 4 kontinentoj.

Ĉiuj fazoj de la ĉi-jara premio (de la varbado al la elektado de internacia ĵurio kaj Esperanto-bibliotekoj) montris la deziron internaciigi ĝin kiel eble plej multe kaj espereble la venonta eldono post du jaroj havos multe pli da partoprenantoj el ĉiuj partoj de la mondo. Laŭ sugesto de Radojica Petrovič, la estraro estas pripensanta ankaŭ la eblon publikigi libroforme la eseojn prezentitajn por la premio ĝis nun, kun la celo same kuraĝigi pli larĝan partoprenon.

Raporto pri la ĵuria kunsido de Premio Maŭro La Torre 2022

„Je la fino de aprilo 2022 ILEI ricevis ĝustatempe du esplor-raportojn, kiuj plenumis ĉiujn kondiĉojn de Premio La Torre. Temas pri „Instrumetodo por Esperanto-kurso bazita sur metakognado kaj aktiva lernado" de Nitta Takamichi (Japanio) kaj „Takso de interreta instruado al franclingvaj lernantoj per la KER-sistemo" de Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau (Francio).

ILEI tuj formis internacian ĵurion por taksi la du laboraĵojn. Akceptis partopreni en ĝi, krom la prezidanto de ILEI Ahmad Mamduhi, Elisée Byelongo, Renato Corsetti, Dennis Keefe, Giridhar Rao, Gong Xiaofeng (Arko) kaj Alessandra Madella (vicprezidanto de ILEI).

La ĵurianoj tuj komencis korespondi retpoŝte pri la eseoj kaj la 12-an de junio 2022 ili kunvenis Zoome por findecidi la gajninton. Ne sukcesis ĉeesti pro teknikaj malfacilaĵoj nur Elisée Byelongo, kiu tamen sendis longan raporton kun siaj konkludoj, kiuj iris en la saman direkton de la finaj konkludoj de la restantaj ĵurianoj.

La diskutado evidentigis, ke ambaŭ esplor-raportoj prezentas tre interesajn sugestojn kaj ideojn por instruistoj. La franca raporto temas pri ambicia esplorado de interretaj kursoj kaj ilia taksado, kiu povus esti tre utila por la komunumo de instruistoj de Esperanto. Tamen ĝi nun ŝajnas ankoraŭ komenca esplorado, kiu bezonas pli da tempo por vere atingi siajn konkludojn kaj konvinke subteni ilin. La japana raporto, male, malgraŭ la pli malgranda skalo de esplorado, ŝajnas pli bone fokusiĝi pri siaj atingoj, dank' al pli klara strukturo, al la indiko de gravaj fontoj kaj al la bela uzo de bildoj kaj ekzemploj por ilustri sian instru-metodon. La ĵurianoj notis ankaŭ ĝian pli seneraran uzon de la lingvo.

Fine de la diskuto, ĉiuj ĵurianoj (inkluzive de Elisée Byelongo en skriba formo) voĉdonis favore al la raporto de Nitta Takamichi, kiu estas, do, la gajnanto de Premio Maŭro La Torre en 2022.

La ĵurio ankaŭ varme invitas la aŭtorojn de ambaŭ eseoj pensi pri publikigado de la raportoj aŭ parto de ili en Internacia Pedagogia Revuo (IPR) de ILEI, ĉar ili estos tre gravaj kontribuoj al la diskutado pri la instruado de Esperanto kaj al ĝia praktiko."

El la landoj kaj sekcioj…

Ĉinio

Serio-evento de „Saluton el Esperanto" okazis en Jiangsu-Teknologia Universitato

Tiu ĉi semestro en la lasta februaro komenciĝis dum severa kronvirusa epidemio. Pro praktikado de strikte preventa politiko en Ĉinio, parto de la studentoj devis kvaranteni en siaj hejmoj kaj aliaj devis resti en siaj internulejoj de la universitato. Ili ne havis kuniĝon kaj distraĵon estante nur en sia kaĝo, kiam ili povis lerni per interreto virtuale. Studenta E-Societo de Jiangsu-Teknologia Universitato intence organizis okazigi evento-serion por vigligi la vivon de siaj membroj, kiu estis nomata „Saluton el Esperanto".

La serio okazis ĉefe interrete. La unua el la eventoj estis la virtuala renkontiĝo „Konigo de Esperanto” en la 22-a de aprilo, kun ĉeesto de pli ol 400 studentoj. S-ro Longarko (Zhang Changsheng), prezidanto de la loka Esperanto-Asocio (en la urbo Changzhou), invitita de la universitato kiel E-instruisto antaŭ kelkaj jaroj, kaj s-ro Johano Huang, prezidanto de IKEF-Nord-Ameriko, kiu loĝas en Kanado, partoprenis en la evento kiel gastoj. En la renkontiĝo, s-ro Longarko kondukis la virtualkunvenon kaj s-ro Johano Huang prelegis pri la situacio de Esperanto en la mondo kaj reliefigis ĝian internacian komercan valoron. Precipe li prezentis siajn internaciajn komercajn spertojn, kiuj jam aperis en lernolibro de usona universitato. Studentoj tre interesiĝis pri Esperanto kaj ĝiaj valoroj en diversaj kampoj kaj vigle faris demandojn kaj la gastoj respondis. Ankaŭ la estro de la Studenta Societo raportis pri siaj aktivadoj por la Societo kaj Esperanto-kurso en la universitato.

Krom la renkontiĝo, dum la serio okazis ankaŭ kolektado de salutkartoj kaj poezia voĉlegado en Esperanto. Kiel juĝisto s-ro Longarko prijuĝis la voĉlegadojn kaj elektis gajnintojn por la unuaj tri lokoj plus kelkajn laŭdindajn partoprenintojn.

La serio ne nur tre stimulas la vivon de la studentoj, sed ankaŭ stimulas iliajn aspirojn al Esperanto kaj ĝia aplikado en diversaj kampoj. La organizanto ne nur intencis disvastigi nian lingvon, sed ankaŭ provis instrui pri internacia komercado per Esperanto.

Informis: Longarko

Germanio

TORPEDO (Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia) en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo
Tempo: 30.09.-03.10.2022
Organizanto: GEC (Germana Esperanto-Centro, Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo), kaj AGEI (Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj, landa sekcio de ILEI)
Loko: DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6 (Interkultura Centro Herzberg)
Temo: Fakprelegoj, prezentadoj, spertinterŝanĝo pri instruado de Esperanto, metodika trejnado.
Enhavo: Raportoj, analizoj pri reta instruado, spertoj pri virtualaj kursoj, babilrondoj ktp., komparado kun metodoj por tradiciaj, ĉeestaj kursoj.

Trarigardo de retaj instrumaterialoj, didaktikaj helpiloj, virtualaj lerno-proponoj, kompilado de listo de rekomendataj, taŭgaj lernmaterialoj, vortaroj, helpiloj por malpli spertaj gekolegoj. Informado, detaloj pri la novtipaj UEA/KER-ekzamenoj (B1-C2).
Aliĝilon, detalojn, informojn pri rabatoj, subvencioj bv. peti de: zsofia.korody@esperanto.de.

Zsófia KÓRÓDY

Italio

La itala sekcio de ILEI ploras pro la perdo de du el siaj plej gravaj kaj laboremaj membroj: sinjorino Elvia Belluco el Padovo kaj profesoro Pedro Aguilar Solà el Torino.



Elvia estis kolegino, kun kiu facilis kunlabori. Kun granda dankemo memoras ŝin la multnombraj gelernantoj de KIREK, la itala Komputil-Reta Esperanto-Kurso. Ŝi instruis la lingvon pere de ĝi al 251 homoj kaj 49 el ili fariĝis vere aktivaj uzantoj de Esperanto. Ŝi estis lerta tradukinto kaj kunlaboris en la pretigo de la vortaro Itala-Esperanta de Carlo Minnaja.
Ankaŭ por la Esperanto-grupo de Padovo la forpaso de s-ino Elvia estas grava perdo.
(*surfote videblas Elvia Belluco kun profesoro Humphrey Tonkin*)



Sekve de grava kormalsano forlasis nin profesoro Pedro Aguilar Solà la 14-an de junio 2022. Li estis instruisto de la hispana lingvo kaj multe faris por pli efika instruado de Esperanto. Li daŭre instruis pere de ĉeestaj kaj perretaj kursoj kaj seminarioj, je kiuj ni povis profiti. Ankoraŭ dum la tuta pasinta jaro li gvidis kurson por homoj, kiuj deziris prepari sin al la triagrada ekzameno ĉe la Itala Instituto de Esperanto. Lia lernolibro en la itala *Corso intensivo di Esperanto per allievi e autodidatti* (Intensiva kurso de Esperanto por lernantoj kaj memlernantoj) estas tre ofte uzata dum niaj kursoj, ĉar ĝi enhavas ankaŭ ŝlosilon de la ekzercoj.
Jen kelkaj voĉoj de samideanoj, kiuj konis persone prof. Pedro:

„Dum la pasintaj monatoj Pedro instruis (rete! kaj tio estis lia heroa ago!) la belecon de Esperanto, la poezion, la literaturon kaj (indignoplena!) ankaŭ la gramatikon de Esperanto al ni, gekursanoj de tria-grada kurso.
Li konis persone la gigantojn (kiel Kalocsay, Baghy ...) kaj rakontis pri ili al ni rava-reve!
Ni, gekursanoj, havis la honoron koni lin kaj, estontece, eble ni rakontos al novaj gekursanoj pri Pedro.
Mi scias, ke mi fieros, ĉar mi konis lin, eble mi ankaŭ diros, ke mi estis lia lernanto (sed, tion mi diros nur post necesa studado!)".

Paolo SCOTTI

La dioj decidis ke mi mortu malrapide pecon post peco. Jen alia peco de mia vivo, kiu malaperas!
Ĝis Pedro!
Amike

Renato CORSETTI

El ĉiuj homoj, kiujn mi konis en mia vivo, Pedro estis la plej nobla. Li nenion petis por si kaj ĉion donis al la aliaj, en Venezuelo kaj en Italio.
Por honori lin, ni memoru pri liaj proponoj, ankaŭ koncerne la postkursan agadon, tio estas la organizitaj regulaj programoj de niaj kunvenoj.

Gian Carlo FIGHIERA

La tuta teamo de la kurso KIREK kaj mi persone perdas karan amikon.
Pedro helpis al ni kaj estis ĉiam ĉe nia flanko pere de siaj instruoj.
Antaŭ nelonge mi parolis kun li per telefono pri la venontjara Universala Kongreso de Esperanto en Torino, en kiu li nepre deziris partopreni kune kun multe da eksaj gelernantoj de KIREK. Por honori lian memoron ni daŭrigu niajn studojn kaj realigu liajn revojn!

Daniele BINAGHI

Serbio

Post plurjara paŭzo la landa asocio Serbia Esperanto-Ligo (SEL) refondiĝis en 2021. Ekde decembro 2021 SEL organizis 5-monatan kurson de Esperanto kunlabore kun la Asocio de Tradukistoj de Serbio. La retan kurson gvidis Jovan ZARKOVIĆ (Zarkoviĉ), prezidanto de SEL kaj membro de ILEI, kaj Živanko (Ĵivanko) NOVAKOV. Ĝin sukcese finis 6 kursanoj per ĉeesta

ekzameno komence de junio en la sidejo de la landa asocio, el kiuj 2 same sukcese partoprenis ankaŭ la retan KER-ekzamenon de UEA.



Post tiu ĉi kurso tuj komenciĝis somera ekzercado por kursfinintoj, sub la gvido de Živanko NOVAKOV, por teni la akiritan lingvoscion freŝa ĝis la komenco de la daŭriga kurso planata por aŭtuno.

Preskaŭ paralele kun la menciitaj kursoj – ekde februaro 2022 – estas organizata ankoraŭ unu kurso por komencantoj nevidantoj, kiun gvidas Nedeljka LOŽAJIĆ (Loĵajiĉ), membro de ILEI, estro de la landa Sekcio de nevidantaj esperantistoj kaj prezidantino de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj). Tiun ĉi retan kurson – kun kelkfojaj ĉeestaj renkontiĝoj – frekventas pli ol 10 partoprenantoj, kiuj uzas brajligitan lernolibron.

Aranka LASLO


AMO ĝis la jarfino



Jen la reviziita plano por AMO ĝis la Jarfino.**T** = temo

AMO 92: IKEF. Sept. 25 (dimanĉe). Kun nia komerca faka asocio, plejparte virtuala. IKEF kaj AMO jam bone kunlaboras teme kaj teknologie. **T:** Eŭrazia Ekonomia Komunumo (EEK). En bona ordo.
AMO 93. Kubo planas seminarion fine de septembro aŭ komence de oktobro. Sekvos pli firmaj informoj. KEA havas iom novan estraron kaj revenas al la vivo post la kovima epidemio.
AMO 94: Okt 28-30 en Triesto, Italio. Kunlabore kun ELF-AREK, nia faka asocio pri filatelo kaj kolektistoj. **T:** Arĥivado. M. Belošević (komisionano) partoprenos.
AMO 95: Nov. 11-14, Kroatio, **T:** Vortara farado. Kadre de ilia jara ĉiujara aranĝo honore al Lucija Borčić. Espereble hibrida seminario per *Zoom.*
AMO 96: Senegalo, decembre, proponata temo: **T**: Interafrika kunlaboro. Preparas kontribuon Burunda E-Asocio, sub gvido de la estrarano de UEA pri AMO, Jérémie Sabiyumva.
Vi rimarkos, ke ni proksimiĝas al la centa seminario, kaj ni jam planas tion. Petoj por aldoniĝo al la ricevo-listo de la EKO-komunikoj bonvenas. Ni donos plian informojn pri AMO 100 en la sekva numero de IPR.

Stefan MacGill



INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits (*la dua membro elektota*).
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny, Mireille Grosjean.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*
ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*
TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**
LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. Nedeljka Ložajić, *nedeljkalozajic@gmail.com*.
kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.
kaj aliaj *(daŭrigo sur p. 39)*

La novaĵo 2023 ni Kun-Kongresu!



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

56-a ILEI-KONGRESO

5a-12a Aŭgusto 2023

Linjano Orsabla

***Lignano Sabbiadoro*, Itala urbo**

La 56a Kongreso de ILEI okazos en Italujo, en la strandurbo Linjano Orsabla (Lignano Sabbiadoro, UD) lokiĝanta mezvoje inter Venecio kaj Triesto, en ampleksa kongresejo kiu permesos al ĉiuj kongresanoj kune loĝi, manĝi kaj labori, kaj ankaŭ ferii.

La kongresejo disponas, kaj senpage disponigas al niaj kongresanoj, privatan plaĝon, akvoparkon, olimpikan naĝejon, plurajn altrangajn ekipitajn spacojn sportajn enajn kaj eksterajn.

En la sama kongresejo kaj samdate estas ankaŭ invitata la 79a IJK de TEJO, kio permesos ĝeneralan kunan analizadon de la plej taŭgaj manieroj evoluigi la instruadon de Esperanto laŭ nia kongresa temo

Instrui Esperanton en lernejoj

Por la lerneja simpozio estas planataj kontaktoj kun la Universitatoj de Udeno kaj Venecio, ambaŭ kun gravaj lingvaj studoj.

Tra la semajno estos proponataj ankaŭ multnombraj ekskursoj por la kongresanoj kaj iliaj akompanantoj, kaj plurnombraj koncertoj de la plej elstaraj internaciaj artistoj.

Kotiztabelo

Aliĝperiodo →	ĝis 2022-12-31		ĝis 2023-06-30		de 2023-07-01	
Aliĝkategorio ↓	A	B	A	B	A	B
ILEI-membro	80	60	95	70	110	85
Ne-membro	105	75	120	85	140	95
Infanoj malpli ol 18 j.	10	10	10	10	10	10
Junuloj, handikapitoj ktp	40	30	50	35	60	40
1- aŭ 2-taga partopreno *	25	15	30	15	35	20
Nur virtuala partopreno	25	15	30	15	35	20

* La dumtempa partopreno inkluzivas, por la ceteraj tagoj, la rajton je virtuala partopreno.

'Kotizoj A'. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
'Kotizoj B'. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).
'ILEI-membro' estas tiu, kiu ĉe sia aliĝo jam pagis kotizon al ILEI por la jaro 2023.
'Infano' estas, ĉi tie, kiu naskiĝis post 2004-12-31a.
'Junulo' estas, ĉi tie, kiu naskiĝis post 1997-12-31a.
La Honoraj Membroj kaj la devigaj akompanantoj de handikapuloj ne pagas aliĝkotizon.

Por informoj, aliĝoj, mendoj de loĝado, ekskursoj ktp: **https://2023.kongreso.org**
Por peti informojn, konsilojn, sugestojn: **ilei@kongreso.org**

Aliĝilo

Nomo persona _____ Nomo familia _____

☐ Ino ☐ Viro. Naskiĝdato _____ Lando _____

Adreso _____

Poŝtkodo _____ Urbo _____

Retpoŝto _____ Telefono(j) _____

☐ Mi bezonas invitilon. Pasportaj: n-ro _____ ŝtato _____ finvaliddato _____

Mi kotizas per € _____,00 kaj mi kontribuas ILEI-agadon per € _____,00 pagante per

☐ nun per kontanta mono ☐ Paypal aŭ kreditkarto ☐ Al ILEI-konto ĉe banko ☐ Al ILEI-konto ĉe UEA
(Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago de la kotizo. Detaloj pri la kontoj: paypal <info@edistudio.it>; konto ILEI ING-banko IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A (Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio); ILEI-konto ĉe UEA ilek-a, indikante "ILEI-Kongreso 2023", kun kopio al ni <ilei@kongreso.org>.

Por la Lingva Festivalo mi proponas prezenti la lingvon _____
Mi kontribuos al la Arta Vespero per _____
Aliaj kontribuproponoj por la konferenca programo: _____
Aliaj komentoj, sugestoj, proponoj, manĝpreferoj ktp. _____
Loĝado (povos esti de vi kaj ni traktata poste): Alvendato _____ Forirdato _____
La kongresanoj loĝos en grupaj ĉambroj de 4 aŭ pli da litoj. Krompagante, eblas mendi dulitan aŭ unulitan ĉambron, ĝis disponeblo. ☐ Mi deziras loĝi en dulita ĉambro, ☐ Mi deziras loĝi kun _____
☐ Mi deziras loĝi en unulita ĉambro
Manĝolimigoj kaj aliaj sciendaj personaj detaloj _____

Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn el la Kongresa Regularo, p. 6-9 (vd la retpaĝon)

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por la C-landoj**. **Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €.** Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, <*ilei.kasisto@ gmail.com*>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.


* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, *www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-70) 931-0530.*
Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.

Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aŭgusto 2022,
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2022.


Recording...
LIVE
Custom Live Streaming Service
Albrecht Kronenberger
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
ilei
23-30 julio 2022
8-a Tago
VEKI-3
2022
"Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado"
Ahmad - ILEI
Radojica PETROVIĆ (RS)
Bručjo Kasini
ILEI-Simpozio
29-30 julio 2022
Kadre de VEKI-3
2-a Tago
Fernando Pita
Laura Brazzabeni
Rob Moerbeek
Soohyean PARK (Koreio)
Alessandra
Tserendejid Mongolio
Aristophio A Alves Filho, Brazilo
Viko, Civiencia SL
Katalin (HU/NL)
Ilona Koutny
Marija Belošević
fabrizio
Gxan Pfleger el Italujo
Lajos Molnár
Paulo Sergio Viana
Reza Kheirkhah (Tajvano)
Araksja Elbakjan, Armenio
Prof. Rubén Sanchez
Longarko el Ĉinio
Enrico G. Borrello, Massa, Italio
Arko (Ĉinio)
Stop Video
Security
Participants
51
Polls
Chat
2
Share Screen
Pause/Stop Recording
Breakout Rooms
Reactions
Apps
Whiteboards
More
Type here to search
18°C Pilvistä
ENG
08:46